

L[★]umo

ISSN: 0827-3154

ENHAVO | SKIZO

Kanadaj novaĵoj	3
Raportoj kaj kontribuaĵoj	14
Diversaĵoj	38

LIMDATO

POR LA VENONTA NUMERO

La 14a de aŭgusto 2017

lumo.revuo@gmail.com



**Lumo estas la revuo de
la Kanada Esperanto-Asocio.
Por membriĝi en KEA,
vizitu nian retejon.**

DETALE ENHAVO DE LA NUMERO

Redaktorina rubriko	1
KANADAJ NOVAĴOJ	3
Nekrologo de la esperantisto Jean Sorel	3
Nova apo: Amikumu!	8
Anoncoj de KEA: stipendioj kaj estrara kandidatiĝo ...	10
Kalendaro de venontaj eventoj	13
RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ	14
Planlingvoj	14
Daŭripova evoluigo, ĉu ankoraŭ valida?	25
Mielmonato en Krimeo	26
La homa naskiĝo	31
Legendo de Acersiro	34
Kial mi elektis boatadon kiel mian hobion	36
DIVERSAĴOJ	38
Peto al la kunlaboro por la ekspozicio en Jokohamo ..	38
Peto de Korespondo	40
Lingvoilo	41
Krucvortenigmo	42
Vortludoj por geknaboj	44
Kontribuantoj	46

Redaktorina rubriko

Saluton. Ĉi tiu freŝa numero *iom* malfruas!

Inter universitato, projektoj, renkontiĝoj kaj vojaĝoj, la teamo de Lumo ne povis rapide trakti la aferon; ni pardonpetas.

Dum tiu tempo – trista novaĵo – la esperantisto Jean Sorel forpasis. Zdravka Metz verkis belegan portreton de li kaj de lia laboraĵo. Fine de aprilo, Amikumu estis lanĉita kaj ĝi permesas renkonti aliajn esperantistojn. Richard Delamore, kiu estas en la teamo de tiu apo, klarigas kiel ĝi funkcias. Fine de majo ankaŭ okazis en Hamiltono MeKaRo, la Mez-Kanada Renkontiĝo – kaj mi aŭdis ke ĝi estis tre ĉarma kunveno! Mi tuj povas anonci, ke Kiara Waters donos pli da detaloj pri ĝia etoso en numero 2017/3. Nuntempe okazas NASK en Norda Karolino (Usono) kaj KEA proponas stipendiojn por NOREK kaj ARE.

Ĉu vi iomete konfuziĝas pri kiam okazas ĉiuj eventoj? Ne timu, mi resumis ĉion en eta Kalendaro de venontaj eventoj. Tiu kalendaro kaj la aliaj anoncoj aperos denove en venonta numero, same kiel la alvoko por esti estrarano de KEA.

Jen klerigaj kontribuajoj: Yury Jakymec proponas grandan kaj interesan artikolon pri diversaj planlingvoj, Tamara Ne Amara vulgarigas la koncepton de daŭripova evoluigo, kaj Jed Meltzer dividas siajn impresojn pri la socia kaj politika situacio en Krimeo dum sia mielmonato tie.

Redaktorina rubriko

Sekve, Lottie Ericson proponas rakonton pri la Homa naskiĝo, kaj Saĉjko rakontas legendon de Acersirolo el indiĝena rakonto. Ĝuste por la bela vetero, Wally du Temple klarigas kial li elektis boatadon kiel sian hobion.

Karaj legantoj, aktivu: estas alvoko por sendi lernolibrojn en via gepatra lingvo por ekspozicio en Jokohamo, Japanio, kaj ankaŭ juna esperantisto deziras korespondi kun samideanoj. Antaŭ krucvortenigmo kaj vortludoj etas eta priskribo de reta ilo kiun mi trovas tre utila: Lingvoilo.

Bonan legadon!



Kamila

[Camille-Amélie Koziej Lévesque]

Redaktorino



KANADAJ NOVAĴOJ

Nekrologo de la esperantisto
Jean Sorel

**«Por mi, la homo estas homo, ĉu blankulo,
nigrulo aŭ ruĝulo, mi ne vidas la diferencon»**

- .Jean Sorel (el Vivprotokoloj 1994)



Jean Sorel – inter esperantistoj nomata Johano – naskiĝis blinda en Jacmel [Ĵakmel] (Haitio) en 1928, sed la blindeco ne estis obstaklo por lia edukado, lernado, instruado, vivo, vojaĝoj, ŝatataj aktivecoj.

Lia patrino traktis lin egale kiel aliajn infanojn kaj li ne sentis sin malsama, sed tute egala al aliuloj. Jam trijara Johano eniris lernejon por sidi en la klaso de sia fratino kaj lerni aŭskultante. En Jacmel lia patrino renkontis francan kuraciston kiu, pro sia aĝo, perdadis la vidpovon. Kiam li aŭdis pri Johano, la kuracisto mendis instrulibron el Francio por lernigi lin skribi kaj legi brajle. Johano estis unu el la unuaj lernantoj de iu privata lernejo por blinduloj en Haitio kies programoj similis al tiuj de publikaj lernejoj. La problemo estis ke la instrulibroj ne ekzistis

brajle. Johano mem transskribadis historiajn aŭ geografiajn librojn laŭ ies legado el ordinaraj libroj. Endome, la patrino parolis france kaj decidis instrui al siaj infanoj la anglan kaj hispanan. La kreolan li lernis ludante ĉe la strato kun aliaj infanoj kaj tiel li ekhavis intereson pri la lingvoj. La familio havis kurtondan radioaparaton, kaj Johano ĉiutage sidis kvar-kvin horojn por aŭskulti radiostaciojn de la tuta mondo, ĉefe anglajn kaj hispanajn.

Post la mezgrada lernejo li daŭrigis la studadon en Usono, en la ŝtato Masaĉuseco ĉe Lernejo Perkins por Blinduloj en Watertown kaj Harvard. Tri jarojn poste li revenis Haitien kun diplomo de Pedagogia Fakultato.

En la ĉefurbo Portoprinco, Johano instruis al blindaj infanoj kaj ankaŭ al vidantaj instruistoj kiuj specialiĝis por labori kun blinduloj. Samtempe li ekstudis juron kaj vespere laboris ĉe Radio Haïti. Ĝi estis ne nur radio por la tuta lando, sed oni povis aŭdi ĝin pere de kurtondaj radioj. Multaj haitianoj loĝantaj ekster la lando aŭskultadis ĝin regule.

La radio estis tiutempe iuspeca scenejo kie Johano estis la aktoro. Foje lia voĉo devis esti ĝoja, aŭ male, pli rapida aŭ ekscita. Tiam ne ekzistis televidiloj, do radioaparatoj estis tio kio ne nur devis transdoni la informojn, sed priskribante la eventojn, ankaŭ helpi la homan imagon. Li ŝatis la laboron ĉe la radio same kiel li ŝatis geamikojn kaj aparte la socian vivon. Tiu profunda emo renkonti la aliajn kaj havi komunan celon, kaŭzis ke li multe agis por fondi la unuan societeton por blinduloj en Portoprinco kaj en aliaj urbetoj en 1952.

Pro la politika situacio en Haitio en 1960, kiam diktatoris Duvalier, Johano ne plu volis vivi en Haitio. Li petis vizon por Usono ĉar li sentis ke li ne plu povas esprimi sian opinion libere. En 1964 li estis akceptita pro sia alta edukiteco. Li alvenis Novjorkon sed ne por longa tempo. Koresponda internacia lernejo, gvidata de la usona Instituto Hadley proponis laboron al Johano kiel perkoresponda korektanto por la angla kaj franca lingvoj en Montrealo. Samjare, Johano translokiĝis al Kanado.

En 1965 la direktoro de la internacia lernejo proponis al Johano ekstudi Esperanton pere de libro kaj kasedo dum tri monatoj. La ideo de internacia lingvo ne nur entuziasmigis lin sed li ĝojis pri la ekzisto de la Montreala Esperanto-Klubo kaj Kanada E-Asocio, al kiuj li aliĝis. Li plezure partoprenis lokajn renkontiĝojn kaj landajn kongresojn.

La Universalan Kongreson malkovris Johano en la jaro 1971 en Britio, kaj li tuj ekŝatis tiele vojaĝi kaj viziti la mondon. Post tiu kongreso, li regule partoprenis ĉiujn krom tiuj kiuj ne okazis samlande kiel la esperantaj kongresoj por blinduloj. Por li «Esperanto-kongreso estas granda familia renkontiĝo». Ne fondinte propran familion, geamikoj, samideanoj, estis liaj familianoj. Li preferis kongresojn por blinduloj ĉar pli facilis «renkontiĝi kun 200 ol kun 2000 homoj».

La filozofio de Johano estis iuspeca realisma optimismo. De ĉi tio venis lia opinio pri diskriminacio: «ĝi ne tute povas malaperi ĉar ĉiam estos iaj individuoj kiuj pensos alimaniere. Sed mi esperas ke la socio kun ĝiaj plimultoj vivos kun respekto kaj toleremo».

Kiel enmigrinto kaj handikapulo, li ekŝatis la ideon de la «Multetna asocio por la integriĝo de handikapitaj personoj». Li estis unu el ĝiaj fondintoj kaj tuj aktivis kiel estrarano, foje reprezentante la Asocion ĉe radio aŭ gazetaro. Li membriĝis ankaŭ en la Kanada Konsilio de Blinduloj. La ekzistanta literatura haitia klubo konis Johanon, kiu ne nur rilatis kun verkistoj sed mem foje verkis kaj legis siajn poemojn.

Oni nomis lin helpanto de blinduloj en Haitio, ĉar li aĉetadis, kolektadis aŭ riparigadis ricevitajn brajlajn maŝinojn, tajpilojn, bastonojn por marŝado, kaj poste li trovis vojojn por la sendado al Haitio. Dum sia lasta translokiĝo, li decidis sendi 18 kestojn da libroj brajle skribitaj al sia naskiĝlando.

Post pli ol 50-jara helpo estis inde nomumi Johanon kiel honoran civitanon de Portoprinco. Pro tia aktiva socia vivo, li estis okupita per volontulaj laboroj kaj, post lia emeritiĝo, la tagoj pasadis rapide. Li diris: «tro rapide por ĉion fari. Kiam ni iel helpas niajn homajn gefratojn, multfoje pli granda estos nia rekompenco. Do, homo estu bona, krea, pozitiva, helpema. Tiel mi vivas. Mi kvazaŭ havas iun ene de mi kun kiu mi komunikas, kaj ofte dimanĉe mi iras preĝejen por preĝi, mediti kun la kredo ke iuj enaj mesaĝoj realiĝos iun tagon; kaj ke ne estu malsato, milito kaj malaperu maljusteco ĉie en la mondo.»

**«Mi konscias ke miaj pozitivaj ondoj kuniĝas kun ĉiuj homaj, pozitivaj pensoj,
kaj tiel la homoj vivos pli bone en la mondo».**

Li tre ŝatis la spiritan liberecon, kiu baziĝis sur kredo kaj helpis lin esti granda optimisto, ridemulo kaj ŝercemulo.

Tiel ni memoros lin kiu merite ripozas ekde 17a de aprilo 2017.

Zdravka Metz

Por lastfoje honori la grandan homon kiu estis Jean Sorel, eblas fari individuan donacon al la [Association des aveugles et amblyopes haïtiens du Québec](#)



Kio estas Amikumu?

Amikumu estas poŝtelefona aplikaĵo (apo), kiu helpas uzantojn malkaŝi la 100 plej proksimajn esperantistojn apud si. Esence, Amikumu celas fariĝi la verda stelo de la nova generacio. Por uzi la apon oni bezonas saĝtelefonon. Oni tiam devas viziti la butikon "Appstore" aŭ "Google Play" kaj serĉi "Amikumu"n. Kiam oni elŝutas ĝin, oni simple devas sekvi la malmultajn indikojn por starigi konton.

Kio estas la nuna stato de Amikumu?

La 23-an de aprilo, Amikumu lanĉiĝis tutmonde por Esperanto-parolantoj. En malpli ol unu semajno, 2.000 esperantistoj kreis kontojn kaj ekuzis la apon. Nuntempe, pli ol 4.500 esperantistoj ĝin uzadas. Multe da esperantistoj jam profitas de la novaj oportunoj kiujn ĝi kreis.

Ekzemple, Andy Hernández Martínez publikigis en Fejsbuko, "Mi estis preparanta mian dorsosakon por vojaĝi al Teruelo por la Hispana Kongreso kiam mi hazarde malfermis la apon Amikumu kaj trovis nekonatan junan esperantistinon el Finnlando kiu estis nur je cent metroj de mi. Mi tuj mesaĝis kaj post kvin minutoj ni renkontiĝis".



Alia esperantisto, Ruth Keves-Cohen, ankaŭ skribis,

“Pro Amikumu mi eksciis, ke konatulo mia, Raúl, troviĝas en mia urbo dum la semajnfino pro matematika kongreso. Mi invitis lin kaj lian amikinson Rocío al mia hejmo, kaj ni ĝuis spontanegan tagmanĝon kune kun Erin kaj ŝia bebo Yaša! Dankon Amikumu!”

Kiuj estas la estontaj planoj de Amikumu?

Lastatempe, Amikumu asociiĝis kun la Montreala lingva festivalo, Langfest. Ni intencas la 25-an de aŭgusto lanĉi ankoraŭ novan version de la apo en la angla kaj franca. Ankaŭ ni intencas provizi niajn jamajn uzantojn en Montrealo, Otavo, Toronto kaj Kebeko per la eblo filtri proksimulojn laŭ lingvo. Ekzemple, se oni volas trovi la 100 plej proksimajn parolantojn de la araba, Amikumu ebligas tion.

Prepare al tio, ni estas serĉantaj esperantistojn en Montrealo, Otavo, Toronto kaj Kebeko por fariĝi ambasadoroj de Amikumu. Ambasadoroj helpas diskonigi informon pri Amikumu inter poliglotaĵaj grupoj, universitataj studentoj kaj lingvemuloj. Se vi estas esperantisto, kiu loĝas en unu el tiuj urboj kaj volas helpi sukcesigi nian lanĉon tie, nepre kontaktu min ĉe info@amikumu.com

Anoncoj de KEA: stipendioj kaj estrara kandidatiĝo



NOREK ([Nord-Okcidenta Regiona Esperanta Konferenco](#)) okazos en Paul's Motor Inn en Viktorio, Brita Kolumbio, **septembre de la 22a ĝis la 24a 2017.**

Ĉiuj bonvenas!

Por pli da informo kaj programo, bonvolu sendi retmesaĝon al norek2017.esperanto@gmail.com

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas unu stipendion de ĝis 300 CAD al junulo por ebligi partoprenon en la ĉijara [Nord-Okcidenta Regiona Esperanto-Konferenco](#).

Ĉiu petanto

- (a) estu naskiĝinta je la 1a de Januaro 1987 aŭ poste;
- (b) estu Kanada rezidanto;
- (c) estu membro de KEA (ni bonvenigas petojn de novaj membroj de KEA, kaj oni eĉ povas [aliĝi](#) kaj tuj poste peti stipendion); kaj
- (ĉ) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al mateo416@gmail.com, **ĝis la 22a de Aŭgusto 2017.** Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, klarigu siajn financajn bezonojn, kaj skribu sian mesaĝon en Esperanto. Ne timu, se via Esperanto ne estas perfekta; vi havas pli bonan ŝancon ricevi stipendion, se via mesaĝo estas skribita en Esperanto kun eraroj, ol se ĝi estas skribita en alia lingvo. Ni kutime ricevas malmultajn petojn por stipendioj, do ĉiu peto ja konsideriĝos. Decidos pri la aljuĝo de stipendioj la eduka komisiono de KEA.

2.

ARE (Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto) kunigas esperantistojn el nordorienta Ameriko dum tritaga semajnfino. Organizas ĝin la Esperanto-Societo Kebekia lige kun aliaj esperantaj asocioj kaj kluboj en Usono. La renkontiĝo okazos **de la 7a ĝis la 9a de oktobro 2017**.

La Kanada Esperanto-Asocio (KEA) disponigas unu stipendion de ĝis 300 CAD al junulo por ebligi partoprenon en la ĉijara Aŭtuna Renkontiĝo de Esperanto (ARE).

Ĉiu petanto,

(a) estu naskiĝinta je la 1a de Januaro 1987 aŭ poste;

(b) estu Kanada rezidanto;

(c) estu membro de KEA. Ni bonvenigas petojn de novaj membroj de KEA, kaj oni eĉ povas aliĝi kaj tuj poste peti stipendion; kaj

(ĉ) sendu mesaĝon, en kiu oni pravigas sian peton, al mateo416@gmail.com, **ĝis la 7a de Septembro 2017**. Estas rekomendinde, ke oni priskribu siajn jamajn spertojn en Esperantujo, klarigu siajn financajn bezonojn, kaj skribu sian mesaĝon en Esperanto. Ne timu, se via Esperanto ne estas perfekta; vi havas pli bonan ŝancon ricevi stipendion, se via mesaĝo estas skribita en Esperanto kun eraroj, ol se ĝi estas skribita en alia lingvo. Ni kutime ricevas malmultajn petojn por stipendioj, do ĉiu peto ja konsideriĝos. Decidos pri la aljuĝo de stipendioj la eduka komisiono de KEA.



Estraro de KEA: la deĵorperiodo de la nunaj estraranoj daŭras nur ĝis la fino de ĉi tiu jaro 2017.

Necesas trovi **minimume** ses estraranojn por la sekva dujara periodo. Membroj de KEA rajtas proponi sin kiel kandidatojn, aŭ proponi alia(j)n membro(j)n, kies konsento(j)n ili havigis. Por esti valida, sciigo pri kandidatigo devas atingi la sekretarion de KEA (Matthew Chisholm) antaŭ la fino de Aŭgusto. Vi povas sendi la informon per letero aŭ retmesaĝo, aŭ persone transdoni ĝin. Lia retadreso estas mateo416@gmail.com.

Ne necesas esti jam sperta pri estrara laboro, sed oni devas esti preta partopreni diskutojn kaj doni sian opinion, kiam propono estas farita. **Necesas** tamen en la nuna epoko, ke estraranoj povu komuniki per **retpoŝto**. Ankaŭ estas dezirinde, ke ĉiu estrarano povu uzi Skype-on por partopreni de tempo al tempo parolajn diskutojn kun la aliaj estraranoj.

Notu ankaŭ, ke por esti estrarano aŭ por voĉdoni en KEA-elekto oni devas esti membro de KEA. Kompreneble!

Do, se vi ne estas dumviva aŭ honora membro, kaj ne memoras, ĉu vi pagis kotizon por 2017, bonvolu demandi la sekretarion.

Kalendaro de venontaj eventoj

22 - 29 julio

[102a UK](#) en Seulo, Koreio

5 - 12 aŭgusto

[73a IJK](#) en Aneho, Togolando

19 aŭgusto

[Paralela Universo](#), Tutmonde

22 - 24 septembro

[NOREK](#), Viktorio, Brita Kolumbio, Kanado

7 - 9 oktobro

[ARE](#), Silver Bay, Usono

**Kaj ne forgesu
viajn lokajn
e-renkontiĝojn!**



meetup

A amikumu

RAPORTOJ KAJ KONTRIBUAĴOJ

Planlingvoj!


Eltirita de la persona [blogo](#) de **Yury Jakymec**

Antaŭ kelkaj semajnoj mi ekkonis tre inteligentan junulon, Charles-on Zinn, studenton kiu scipovas kvar lingvojn. Kvankam li estas poligloto je tiel juna aĝo, oni povas nekutime surpriziĝi pri la lingvoj, krom la denaska angla, kiujn li parolas kun malsamaj niveloj de flueco: Esperanto, Lojĵbano kaj Tokipono. Tiuj estas planlingvoj.

Kvankam hazarde mi jam konatiĝis kun tiu nova amiko, tia sperto pri nova plurlingveco eble baldaŭ pli ofte okazos. La vero estas, ke la kreado de lingvoj el

nenio okazas pli ofte ol ni pensas. La homoj tre ŝatas sperti novajn aĵojn, kaj la kreado kaj testado de novaj lingvoj ne esceptas. Dum lastatempa historio ni vidas, ke novaj lingvoj estas kreitaj de personoj kiuj tion faris pro malsamaj kialoj.

Unu el la plej malnovaj planlingvoj kiujn ni konas estas "**Lingua Ignota**", kreita dum la 12-a jarcento de la benediktana abatino Hildegard de Bingen. Ŝi loĝis en parto de la nuntempa Germanio. **Lingua Ignota** aŭ "**Nekonata Lingvo**" estis eble uzita kiel Mistika kaj Sekreta lingvo.



Oni ne scias kial ĝi estis kreita. Ni nek scias ĉu iu povis paroli la lingvon, nek se estis intenco transformi ĝin en universalan lingvon. Ekzistas tre malmultaj dokumentoj kiuj parolas pri tiu lingvo aŭ ĝia leksiko. En la (anglalingva) [retpaĝo](#) ni povas legi, ke **Lingua Ignota** uzis la latinan kiel bazon de la gramatiko kaj ankaŭ ke ĝi havis propran skribsistemon, konatan sub la nomo "**Litterae Ignotae**", aŭ "**Nekonataj Literoj**."

En 1879 aperis nova planlingvo: **Volapük** (*Volapuko*). Tiu lingvo estis kreita de germana katolika pastro, Johann Martin Schleyer. **Volapük** estas eble la plej malnova planlingvo ankoraŭ uzata. Je la komenco, la lingvo disvastiĝis tra Okcidenta Eŭropo, Rusio kaj Nordameriko. Dum la lastaj du jardekoj de la 19-a jarcento, Volapuko havis pli ol cent mil

parolantojn. **Volapük** havas sian leksikan bazon en lingvoj kiel la germana, latina kaj angla. Ĝi havas 19 konsonantojn, kiuj estas tre facile prononceblaj, kaj multaj el la vortoj estis tiel simpligitaj ke ili jam estas de unu silabo. La plimulto de la parolantoj de la angla aŭ germana ne povus rekoni la vortojn kiuj devenas de iliaj lingvoj. **Volapük** havas 4 kazojn kaj 6 pronomojn, kun iliaj pluralaj formoj. La verboj havas 6 tensojn. La substantivoj ne havas genrojn. Sed pro la kompleksa sistemo de fleksioj kaj pro la vortoj kiuj estas nerekoneblaj por parolantoj de aliaj lingvoj, oni akceptas ke Volapuko ne estas facile lernebla.

Jen kelkaj frazoj en **Volapük**:

Glidis: Saluton!

Vekömö: Bonvenon

Spikol-li Volapüki: Ĉu vi parolas
Volapukon?

Danö: Dankon

Löfob oli: Mi amas vin

Sanö: Sanon!

Labolös deli gudik: Mi deziras al vi bonan
tagon!




Jam en 1890 ekzistis periodaĵojen Volapuko. Ekzistis volapukaj kluboj tra Eŭropo, Nordameriko kaj Sudameriko, kie la parolantoj kaj admirantoj povis kunveni, kaj jam okazis tri internaciaj kongresoj de **Volapük**. Hodiaŭ, ekzistas nur... 20 personoj kiuj flue parolas Volapukon. Kio okazis? Estas certe, ke tiu lingvo malfacile lerneblas, kaj grava grupo de parolantoj komencis subteni la venontan lingvon en mia listo. Sed, laŭ kelkaj artikoloj kiujn mi legis, la malkresko de **Volapük** okazis ĉar Schleyer deziris kontroli la lingvon, kaj akceptis nenian kritikon aŭ proponon por plibonigi ĝin.

Kun tre malmultaj parolantoj, estas malmulte kion oni povas fari per la lingvo. Hodiaŭ, tiuj kiuj parolas Volapukon komunikas tra la interreto, kaj en sociaj retejoj debatas pri diversaj temoj.

Sed ekzistas tre nekutima aktiveco pri Volapuko en Vikipedio; tiu retpaĝo raportas, ke ekzistas 120 485 artikoloj en **Volapük**, preskaŭ la sama kvanto kiel en la urdua, kaj pli multaj artikoloj ol lingvoj kiel la barata, taja aŭ tagaloga – lingvoj kiuj havas milionojn da parolantoj. Kiu havas intereson pri Volapuko povas viziti tiun [retejon](#). En Esperanto, el la vorto Volapuko originis alia vorto: volapukaĵo, kiu signifas strangan, nekompreneblan parolaĵon aŭ skribaĵon.

En 1887 aperis **Esperanto**. La lingvo estis kreita de la pola, juda okulkuracisto Ludoviko Lazaro Zamenhof, kiu nomis ĝin "*La Internacia Lingvo*". **Esperanto** estas tre regula lingvo; ĝia gramatiko havas nur 16 regulojn kiuj ne havas esceptojn. Ĝia leksikono devenas ĉefe de la latinidaj lingvoj, sed multaj vortoj devenas el ĝermanaj lingvoj, multaj el la greka, kaj kelkaj el slavaj lingvoj.




Vi povas legi pli en mia artikolo en ĉi tiu [blogu](#). **Esperanto** estas unu el la lingvoj kiujn mi uzas en la blogo, kaj mi ofte skribas en tiu ĉi lingvo.

Esperanto havas grandan parolantaron. Multaj el la unuaj esperantistoj estis ankaŭ parolantoj de **Volapük** kiuj transiris al la nova lingvo. La internacia lingvo iĝis populara en malsamaj partoj de la mondo, precipe en Orienta Eŭropo kaj en Ĉinio, kvankam ekzistas multaj landoj kiuj havas Eo-klubojn. Hodiaŭ, ekzistas proksimume du milionoj da parolantoj. **Esperanto** estas la plej parolata planlingvo de la mondo. Esperanto estas ankaŭ la sola planlingvo kiu havas denaskajn parolantojn. Ekzistas vasta literaturo en **Esperanto** kun tradukoj de verkoj el aliaj lingvoj kaj ankaŭ verkoj kreitaj en la internacia lingvo. Tre gravaj radiostacioj kiel *Ĉina Radio Internacia* kaj

Radio Vatikana havas regulajn elsendojn en **Esperanto**. Vi ne bezonas iri al Esperanto-klubo aŭ asocio por lerni la lingvon, ĉar ekzistas sendependaj kursoj, kiel ekzemple ĉe la retejo [Duolingo](#). Hodiaŭ, Vikipedio raportas, ke ekzistas 238 255 artikoloj en **Esperanto**, kaj tiu lingvo havas pli da parolantoj ol naciaj lingvoj kiel la islanda, la malta aŭ la irlandia.

Esperanto estis kreita por esti la universala dua lingvo, por faciligi komunikadon inter homoj; ne gravas la kulturo de kie ili devenas. Inter esperantistoj ekzistis ankaŭ diversaj homoj kiuj apogis aliajn planlingvojn kiuj povus pli bone taŭgi por la misio esti universala lingvo. Ne surprize, grupetoj da tiaj homoj apogis projektojn por krei novajn lingvojn aŭ reformi **Esperanton** mem. Ekzistis kelkaj provoj reformi **Esperanton**.



Eble la plej konata projekto por reformi Esperanton estis **Ido**. La nomo de tiu lingvo devenis de la sufikso -ido en **Esperanto**, kiu esprimas ĝeneralan ideon de naskito aŭ posteulo. La lingvo estis konata kiel "**Esperantido**" kio signifas, ke ĝi devenas de **Esperanto**. **Ido** estis kreita en 1907 de lingvoscientistoj kiuj laboris kun referaĵoj kiujn Zamenhof mem konsideris. Gravaj estis la kontribuoj de la franco Louis de Beaufront kaj la lingvisto Louis Couturat. La reformoj de **Ido** precipe forigis la ĉapelojn kaj la hoketon de la "ŭ" en **Esperanto** kaj limigis la uzon de la akuzativa kazo. La adjektivoj dependas nek de la genro nek de la nombro de la substantivoj. Ĝia leksiko ŝanĝiĝis malmulte, kun ioma influo de la franca. Dum la komenco, kelkaj esperantistoj aliĝis al **Ido**, sed post la morto de Couturat en akcidento kaj post la unua Mondmilito, la nombro da personoj kiuj parolis **Idon** malkreskis.

Dum la lastaj jaroj, la nombro da parolantoj de **Ido** kreskis precipe dank' al la interreto. Ni ne scias kiom da parolantoj havas tiu lingvo, sed estas eble pli ol 2000 en la tuta mondo, precipe en Eŭropo. En la [retpaĝo](#) ekzistas pli da informo pri la lingvo, kun regulaj eldonaĵoj.

Jen kelkaj frazoj en **Ido**:

Bona Matino: Bonan matenon

Quale vu standas?: Kiel vi fartas?


Me nomesas: Mia nomo estas

Ka vu prizas voyajar?: Ĉu vi ŝatas vojaĝi?

Ube vu habitas?: Kie vi loĝas?

Me dankas: Dankon

Me ne esas fatigita: Mi ne estas laca



Laŭ ĉi tiu [retpaĝo](#),
nia sekva lingvo,
Interlingua, aperis en 1903,
kaj ĝi estis kreita de la itala
matematikisto Giuseppe Peano. Tamen,
la lingvo ne disvastiĝis. Poste, inter 1937
kaj 1951, sekvis procezo de reformado
kun la subteno de la Internacia Asocio pri
Helplingvoj, IALA, (International Auxiliary
Language Association), kaj sub la gvidado
de la germana-usona lingvisto Alexander
Gode. **Interlingua** estas eble la plej natura
planlingvo proponita kiel universala
lingvo. En Vikipedio vi povas legi pri la
evoluo de **Interlingua**. Ĝi estas sintezo de
tre popularaj lingvoj en la mondo kiel la
angla, franca, itala, hispana kaj portugala,
kaj kun la helpo de lingvoj kiel la rusa kaj
la germana. **Interlingua** estas priskribita
kiel simpligita latina, kaj ĝia prononco
devenas precipe el la angla kaj la hispana
(la vokaloj sonas kiel en la hispana). La
gramatiko kaj la leksiko de **Interlingua**

jam ekzistas en la lingvoj uzataj por krei
ĝin. La substantivoj ne havas genrojn
nek kazojn. La pluraloj estas formataj per
aldono de "-s" aŭ "-es". La verboj ne havas
konjugaciojn. Nur ekzistas 4 tensoj kaj ne
ekzistas la subjunktiva modo.

Ni ne scias kiom da personoj parolas
Interlinguan, sed povus esti proksimume
1500 parolantoj tra la mondo. Kvankam
Interlingua estis kreita en Usono, la
plimulto de la parolantoj loĝas en
Sudameriko, Orienta kaj Norda Eŭropo.
Hodiaŭ ekzistas regulaj eldonaĵoj en
Interlingua, kiel "Panorama" eldonita de
la "Union Mundial pro Interlingua". La
retpaĝo estas interlingua.com. Vikipedio
raportas la ekziston de 20 000 artikoloj
en **Interlingua**. Multaj personoj ne scias
ke la Rockefeller Foundation subtenis la
projekton **Interlingua**.



Jen kelkaj frazoj en **Interlingua**:

Bon Matino: Bonan tagon

Gratias: Dankon

Como sta vos?: Kiel vi fartas?

Aqua: Akvo

Io te ama: Mi amas vin

Domo: Domo

Amarea vos dansar con me?: Ĉu vi dezirus danci kun mi?

En 1955 aperis lingvo nomita "**Loglano**". Ĝi estis kreita de James Cooke Brown. Tiu lingvo estis kreita por enketi kaj testi kelkajn lingvajn teoriojn. En 1987, grupo de spertuloj kreis la Grupon pri la Logikaj Lingvoj (GLL), kaj ili daŭrigis per la evoluigo de alia lingvo, bazita sur Loglano, kun la helpo de tre popularaj lingvoj kiel la angla, mandarena, barata, hispana, rusa kaj araba. Finfine, en Usono en 1997, la nova lingvo estis publikigita: **Loĵbano**.

Loĵbano estis lingvo zorge kreita kaj konceptita por elimini multajn ambiguecojn kiuj ekzistas en la homara komunikado. **Loĵbano** estas nomo kunmetita: **Loĵ** + **ban** = **Logji** (logika) + **bangu** (lingvaĵo). La komputila programado ankaŭ havis rolon en la evoluigo de la lingvo. La gramatiko de **Loĵbano** estas tre simpla, sed alimaniere kompleksa. Ĝia strukturo estas tre unika kaj la vortoj havas malsamecojn kiuj dependas de ilia rolo en la frazo. **Loĵbano** ne bezonas la uzon de tenso por verbo, se tio estas sufiĉe klara en la kunteksto. La neŭtraleco de la lingvo ne nur estis pensita kiel kultura ponto, sed hipoteze kiel komunika ponto kun komputiloj.

Ekzistas proponoj por uzi ĝin por Artefarita Inteligenteco. Ekzistas ankaŭ grupo de vortoj konata kiel "**Sentaj Vortoj**" kiuj estas uzataj por esprimi emociojn. Plia informo troviĝas en lojban.org.



Kelkaj frazoj kiujn mi trovis en omniglot.com

en **Loĵbano**:

Coj: Saluton

Fi'i: Bonvenon

.I do xabju ma: El kie vi estas?

Ki'e: Dankon

Mi do prami: Mi amas vin

U'u: Pardonu


.A'o gleki jbedetke'u: Feliĉan naskiĝtagon

Ni ne scias kiom da parolantoj havas **Loĵbano**. La plej grandaj komunumoj estas en Usono, Kanado, Rusio kaj Svedio. En Usono, la parolantoj kunvenas jare en kunvenoj konataj kiel **Logfest**. Ekzistas malgrandaj komunumoj en aliaj landoj. La parolantoj de **Loĵbano** uzas ĝin en babilejoj kaj grupoj en la interreto. Pri la literaturo de tiu lingvo, ĝi estas nun tre nova kaj ne tre evoluinta. Ekzistas libroj jam tradukitaj al **Loĵbano** kiel "*La aventuroj*

de Alicio en Mirlando", "*La eta Princo*", "*La Metamorfozo*". Vikipedio raportas, ke nuntempe ekzistas 1197 artikoloj en **Loĵbano**.

En 2001 aperis **Toki Pono**, planlingvo konstruita de la kanada tradukistino kaj lingvistino Sonja Lang (naskite Elen Kisa), kiu loĝas en Toronto. (Kvankam ni loĝas en la sama urbo, mi ankoraŭ ne havis la ĝojon ekkoni ŝin.) Laŭ la [Vikipedia retpaĝo Toki Pono](#) ne estas internacia helplingvo, sed filozofia aŭ luda lingvo.

Toki Pono signifas "*La Bona Lingvo*". Ĝi havas 14 fonemojn kaj vortostokon de nur 123 vortoj. La plimulto de la vortoj havas pli ol unu signifon kaj la kunteksto helpas por indiki la signifon de kio estas dirita. La vortoj venas el malsamaj lingvoj kiel la angla, Esperanto, la finna, franca, mandarena kaj Tokpisino.



Ekzistas almenaŭ cent flujaj parolantoj, sed ekzistas ankaŭ pli ol 2500 personoj kiuj partoprenas en malsamaj interretaj grupoj kiuj eklernas kaj praktikas **Toki-Ponon**.

Jen kelkaj frazoj en **Toki Pono**:

Pona: Bona, simpla, ripari, korekti

Moku: Manĝi, Trinki

Suli: Granda, longa, alta, Grava

Jan: Viro

Mi moku e kili: Mi manĝas fruktojn


Mi toki tawa sina: Mi parolas al vi

Sina ken ala ken lape?: Ĉu vi povas dormi?

Seli mute li lon: estas tre varme

Toki Pono estis planita por esti skribata per latina skribsistemo. Sed malsame ol aliaj lingvoj kiujn mi priskribis, **Toki Pono** povas esti skribita per aliaj alfabetoj. Ekzistas ankaŭ skribsistemo de Toki Pono bazita sur modernaj ideogramoj. En la retpaĝo omniglot.com vi povas vidi kelkajn ekzemplojn. La oficiala retpaĝo de la lingvo estas tokipona.org.

Ne ĉiuj el la planlingvoj estis kreitaj por esti alternaj lingvoj por komunikado inter malsamaj kulturoj. Ekzistas lingvoj kiuj estis kreitaj por la artoj, ekzemple en filmarto. La plej fama fikcia lingvo kaj eble la plej fama planlingvo de la mondo estas la **Klingona Lingvo**. Laŭ la retpaĝo kli.org, kiu ankaŭ estas la paĝo de "Klingon Language Institute" (Instituto de la Klingona Lingvo), tiu lingvo estis kreita por aldoni realismon al fikcia gento de eksterteruloj kiuj aperis en la filma kaj televida serio *Star Trek* (Stela Vojaĝo). Tiu lingvo aperis en 1979 kiel grupo de frazoj izolitaj sugestitaj de la kanada aktoro James Doohan, sed la kreaĵon **Klingono** oni atribuas al la usona lingvisto Marc Okrand. **Klingono** havas sian propran gramatikon, leksikon kaj sian propran grupon de slangaj kaj dialektoj. Ĝi estis kreita por aspekti kiel eksterterana lingvo, sed kun ebla prononcado por homaj aktoroj. Kiel eksterterana lingvo, esprimi terajn konceptojn estas tre malfacile.



En 1985 oni eldonis la "Vortaron de Klingono". **Klingono** estas parto de subkategorio de planlingvoj nomataj "fikciaj lingvoj". Nuntempe, la rajtoj pri la oficiala vortaro apartenas al CBS Television Studios.

Jen kelkaj frazoj en **Klingon** el omniglot.com:

Blplv'a'?: Kiel vi fartas?

(senmetafore: Ĉu vi estas sana?)

Nuq'oH pongllj'e'?: Kiel vi nomiĝas?

Maj ram: Bonan nokton

(senmetafore: Bone, estas nokto)

Qapla'!: Ĝis revido!

(senmetafore: Sukcesojn!)


Jih parmaq tlhik: Mi amas vin

(mi akiris ĉi tiun frazon de la apo funtranslations.com. La tradukoj povas ŝanĝiĝi de unu apo al aliaj).

Ekzistas pli malpli 30 personoj kiuj flue parolas **Klingonon**. Sed la nombro da personoj kiuj iom regas la lingvon povus esti inter 200 kaj 300.

Ekzistas kelkaj eldonaĵoj de tradukoj en **Klingonon**. Inter ili, ni havas *Hamleton* kaj *Daŭdeĝingon*.

Ekzistas pliaj fikciaj lingvoj; kelkaj estas pli popularaj ol aliaj. J.R.R. Tolkien, populara verkisto kaj brita filologo, estas rekonata pro la kreado de fikciaj lingvoj por siaj verkoj. Unu el la plej popularaj estas la **Kvenja** lingvo. **Kvenjo** estis uzata en la verkoj *The Hobbit* kaj *The Lord of the Rings* (*La Hobito* kaj *La Mastro de l' ringoj*). **Kvenjo** estas la lingvo de la *Elfoj*, fikcia gento kiu loĝas en Mez-Tero. Tiu lingvo havas leksikon kaj regulojn similajn al tiuj de la finna lingvo, kaj havas ion el la greka kaj latina. Tolkien komencis labori pri la **Kvenja** en 1910. **Kvenjo** povas esti skribata per aliaj skribsistemoj, sed la plej uzata estas **Tengvaro**.



Ekzistas kelkaj verkoj kaj poemoj en **Kvenjo**.


Tamen ne ekzistas personoj kiuj flue parolas la **Kvenjan**, ĉar Tolkien neniam malkaŝis sufiĉajn vortojn por permesi ke la lingvo estu uzata kiel lingvo por ĉiutaga konversacio. Kelkaj vortoj nuntempe uzataj en verkoj en **Kvenjo** estis kreitaj de personoj kiuj scias pri la lingvo.


Inter la projektoj kiuj ekzistas por planlingvoj, ne ĉiuj estas universalaj, sed ekzistas projektoj de helplingvoj kiuj mem baziĝas sur grupoj de lingvoj. Ekzemplo de tio estas **Slovio**. **Slovio** estas internacia planlingvo kreita de slovaka sciencisto kaj lingvisto, Mark Hučko, kiu ankaŭ estas esperantisto. **Slovio** estas internacia lingvo kreita por helpi slavajn parolantojn interparoli. La gramatiko de **Slovio** estas simila al tiu de Esperanto, sed la leksiko devenas de la plej parolataj slavaj lingvoj. Tiu lingvo povas uzi latinan

kaj cirilan alfabetojn. La prononcado de la literoj en la latina alfabeto estas precipe kiel en Esperanto, sed en la cirila estas kiel en la rusa.

Jen fino de la priskribo de mia "*Furordeko*" de planlingvoj. Pliajn lingvojn oni jam povos krei. En Esperanto, ekzistas esprimo (idiotismo) kun la vorto "*lacerto*" kaj ĝi estas "*Ne lacertu!*". [Vikipedio](#) indikas, ke tiu frazo signifas: en Esperanta medio ne parolu alian planlingvon ol Esperanton! Vere novaj tempoj por la lingvoj.

Plibonigita Esperanto-versio fare de Lumo.
Pri faktoj kaj opinioj sole respondecas la aŭtoro.





Daŭripova evoluigo, ĉu ankoraŭ valida?

Tamara Ne Amara

Mi studis daŭripovan evoluigon en universitato. Interesa teoria koncepto. Sed ĉu vere kapabla renovigi nian pensmanieron rilate al la kapitalisma sistemo? Kaj precipe, ĉu kapabla haltigi la frenezajn foruzojn de naturaj rimedoj de la planedo, kies ekosistemoj riskas sinkolapson?

Oni diras ke, principe, ni devus lasi la teron en pli bona stato ol kiam ni alvenis. Ĉiu generacio prenas la naturajn riĉecojn de la tero por kontentigi siajn bezonojn, sed ne ĉiuj riĉecoj estas renovigeblaj. Tranĉitaj arboj rekreskas malrapide; acidigitaj koralrifoj preskaŭ ne plu resaniĝas; forrabitaj rezervoj de petrolo elĉerpiĝas ĝisfunde kaj ne plu eksistos, ĉar ili estas la rezulto de milionoj da jaroj de naturaj procezoj. Kiam akvo mankos kaj la tero sekiĝos, tiam la homaro

ekkonscios, ke senlima kresko en limigita mondo kun limigitaj rimedoj vere ne estas daŭrigebla.

Tri ĉefaj branĉoj difinas la teorian modelon de daŭripova evoluigo; ekonomio, socio kaj la natura medio. Oni devas konscii pri iliaj reciprokaj rilatoj en ĉiuspeca projekto aŭ ago kiu implicas komunan vivon de sociaj grupoj. Ofte oni ankaŭ aldonas kvaran dimension: etiko. Etiko indikas la respekton de moralaj valoroj ligitaj al la maniero transdoni riĉecojn al sekvontaj generacioj.

Niaj politika kaj ekonomia sistemoj, kiuj baziĝas sur la foruzo de naturaj rimedoj, certe pliboniĝas respektante bazajn konceptojn de daŭripova evoluigo, sed ĉu tio sufiĉas en tiu freneze rapide ŝanĝanta mondo?

Juĝos nin venontaj generacioj.

Mielmonato en Krimeo

Jed Meltzer

En februaro de 2016, mi spertis la feliĉan sorton edziĝi kun Deborah Perkins-Leitman. Inter ŝiaj multaj ĉarmoj estis la fakto ke ŝi komprenas la gravecon de Esperanto en mia vivo, kaj kvankam ŝi ne estas flag-svinganta ĝisostulo kiel mi, ŝi decidis lerni la lingvon por dividi kun mi la plezuron kaj riĉecon de nia komunumo en nia kuna vivo. Deborah estas dumviva Rusofilo, kaj estis facila decido por ni viziti Rusion por nia mielmonato. Pro kialoj de laborferioj kaj vetero, ni decidis prokrasti la vojaĝon ĝis julio.



Do granda estis mia plezuro kiam mi notis, ke hazarde okazos en Julio 2016 granda Esperanta aranĝo en Krimeo - Krimeaj Esperanto-Tagoj (KET), en la plaĝa urbo Jalto. Kvankam ni ne antaŭe konsideris iri al tiu regiono, la ideo ĉeesti Esperantan renkontiĝon dum nia mielmonato estis ja alloga. Deborah montrus al mi sian amatan Rusion, kaj mi montrus al ŝi mian amatan Esperantujon. Do ni decidis je tri-semajna vojaĝo, al Moskvo, Sankt-Peterburgo, kaj Krimeo. La vojaĝo en Rusio estis ĝenerale fascina, plezura, bongusta, neforgesebla. Sed vi povas legi multe pri la ĝojoj de turismo en Rusio. Mi volas hodiaŭ paroli specife pri Krimeo.

Oni povas legi diversajn opiniojn pri la politika situacio en Krimeo, rilate al ĝia anekso el Ukrainio fare de Rusio en marto de 2014. Oni povas aŭdi la saman diversecon de opinioj en la stratoj de la regiono. Mi ne intencas esprimi ĉi tie opinion pri kiu «flanko» de la debato ĝustas, sed mi volas doni mian impreson pri la nuna situacio tie, tri jarojn post la anekso, kaj la daŭra efiko de la ekonomiaj kaj politikaj sankcioj kiuj estis starigitaj kontraŭ Rusio kaj Krimeo.

Kelkaj faktoj estas ne disputeblaj. Krimeo estis aneksita fare de Rusio la unuan fojon en 1783. Antaŭ tio ĝi estis ŝtato ligita al la Otomana Imperio. La plejparto de la loĝantaro dumlonge estas rus-parolanta, kvankam ankaŭ ekzistas diversaj minoritatoj kiel la islamaj Krimeaj Tataroj. En 1954, la Soveta ŝtatestro Nikita Ĥruŝĉov decidis transdoni la Krimean duoninsulon el la Rusa Soveta Respubliko al la Ukraina Soveta Respubliko. Ĉar ambaŭ estis partoj de la Sovetunio, la

transdono estis administra afero kaj ne tiom grava. Sed post la disfalo de la Sovetunio en 1991, la manko de Krimeo fariĝis granda strategia problemo por Rusio. La urbo Sevastopolo estas dumlonge la plej grava bazo de la Rusa mararmeo, la sola granda bazo kun tutjara senlacacia enirkapablo. Post la Soveta disfalo, Rusio aranĝis lui la bazon de Ukrainio por 20 jaroj, kaj poste negocis por plilongigi la luadon.

En la pasintaj kelkaj jaroj, la rilatoj inter Rusio kaj Ukrainio pli kaj pli malboniĝis. Mi ne havas spacon por priskribi tiun longan historion, sed multaj observantoj kredas, ke Rusio decidis aneksi Krimeon por certigi ke ĝi povos daŭre teni sian mararmean bazon tie. En marto 2014, oni haste organizis referendumon en kiu granda majoritato de la Krimeanoj voĉdonis por ekŝigi de Ukrainio kaj aliĝi Rusion, kaj la Rusa armeo tuj invadis la regionon por starigi la novan reĝimon.

La referendumo preskaŭ certe ne estis farita juste, kaj ne estis agnoskita internacie, sed ŝajnas ke la rezulto probable estus same eĉ se perfekta referendumo okazus — ne tiom granda majoritato, sed sufiĉe por venki. En mia sperto en Krimeo, la vasta plejparto de la homoj tie konsideras sin Rusoj, kaj preferas esti civitanoj de Rusio. Tamen, mi agnoskas ke mi ĉefe estis en la plej suda parto de la duoninsulo, kaj tio povas esti la plej forte Rusi-apoganta parto.

Do la referendumo kaj la anekso estas konsiderataj kontraŭleĝaj internacie, sed nun post tri jaroj, Krimeo jam integriĝis en la Rusan socion, kaj ŝajnas tre malprobable ke ĝi iam ajn revenos al Ukrainio volonte. Do kion fari nun? Usono, la Eŭropa Unio, kaj aliaj landoj starigis sankciojn por puni Rusion pro la aneksado.

Mi povas kompreni tion, sed vizitinte la regionon, mi nun komprenas ke multaj el tiuj

sankcioj specife punas la homojn kiuj loĝas en Krimeo, ne la tutan landon de Rusio. Tiuj sankcioj inkluzivas la jenajn politikojn:

-Malpermeso de importado de varoj produktitaj en Krimeo

-Malpermeso de provizado de turistaj servoj al Krimeo

-Loĝantoj de Krimeo ne povas akiri vizon por Eŭropo nek Usono per siaj Rusaj pasportoj. Ili povas iri al Ukrainio por akiri vizon, sed tio estas ege malfacila kaj tipe postulas subaĉetadon.

-Fremdaj bankokartoj kaj kreditkartoj ne funkcias en Krimeo. Do se vi havas «Visa»-karton de Rusa banko, ĝi funkcias, sed alikaze ne.

-Fremdaj registaroj ne provizas servojn al siaj civitanoj en Krimeo. Do mi (Usona civitano) kaj Deb (Kanada civitano) ambaŭ estis avertitaj, ke se ni spertus problemon en Krimeo, niaj registaroj ne helpus. Ni ĉiuokaze decidis iri ĉar ni havis la helpon de la esperantistoj, sed alikaze ni (kiel aliaj turistoj) elektus ne viziti la regionon.

Kaj multaj aliaj ekzemploj.

Ni spertis malfacilaĵojn pro la nefunkciado de la mon-rimedoj! Ni ne bone komprenis la situacion antaŭe, ĉar ĉiuj diris «jes, kompreneble kreditkartoj funkcias en Krimeo!» Alveninte, ni trovis ke estas tute maleble por ni uzi bankokarton aŭ kreditkarton, kaj ni devis draste ŝanĝi niajn vojaĝplanojn por elteni per la stoko da kontanta mono kun kiu ni venis. Sed tio estis interesa kaj ĝuinda finfine. Anstataŭ manĝi en restoracioj, ni ofte aĉetis simplan manĝaĵon en bazaroj kaj manĝis ĝin sur la plaĝo. Anstataŭ loĝi en la luksa mielmonateca hotelo kiun ni estis elektintaj, ni loĝis en la studenta loĝejo kie la kongreso okazis, kun la aliaj partoprenantoj.



La politika situacio pezis en la konversacioj ĉe la kongreso. Estis evidente ke okazis akra fendo inter la Rus-klinantaj Esperantistoj de Krimeo kaj iliaj antaŭaj samlandanoj en Ukrainio. Neniuj esperantistoj venis al KET de la ĉeflando de Ukrainio, kvankam ili ĝuis longan kunlaboron kun la krimeaj esperantistoj antaŭ la anekso. Tamen, inter la esperantistoj kiuj venis de Krimeo, estis diverseco de opinioj. Kelkaj ankoraŭ konsideris sin Ukrainianoj kaj nur heziteme akceptis la neceson akiri Rusan pasporton por travivi. Tiuj homoj estas Rusparolantaj, etne Rusaj laŭ propra priskribo, sed ne apogis la anekson. Sed tiuj homoj ŝajnis esti minoritato. Estis mirinde, tamen, ke tiuj diferencoj de opinio neniel damaĝis la respekton kaj amikecon inter tiuj esperantistoj.


Troviĝas bona libro en Esperanto pri ĉi tiu demando: *Krimeo estas nia* de Kalle Kniivilä, kiu eldoniĝis en 2015.

Ili estis malnovaj amikoj dum jaroj antaŭ la anekso, kaj aktuala politika debato ne povas tuŝi la amikecon kreitan dum jaroj. Vere estis rara regalo por mi havi la oportunon aŭskulti la konversaciojn kaj afablajn debatojn inter tiuj amikoj.

Mi certe ne scias kio estos la fina rezulto de la anekso de Krimeo, sed ŝajnas al mi tre malprobable ke la loĝantaro tie akceptos reveni al Ukrainia civitaneco. Kvankam mi ne volas kuraĝigi rusan agresemon kontraŭ ĝiaj najbaroj, mi kredas ke finfine la mondo akceptos la realan situacion. Eble estas sence puni Rusion per sankcioj, sed ŝajnas al mi maljuste puni specife la loĝantaron de tiu regiono pli ol ĉiuj aliaj. Mi esperas, ke la vivo iam povos reveni al normala stato tie. Intertempe, la sankcioj fakte havas la efikon plirapidigi la integriĝon de Krimeo en Rusion. Se turistoj ne povas veni tien el aliaj landoj, nur rusaj turistoj venas, kaj nur rusaj opinioj estas esprimitaj tie. Se Krimeanoj ne

rajtas negoci kun eksterlandaj firmaoj, ili nur negocas kun Rusaj firmaoj. Do la internacia izolado kaŭzas eĉ pli fortan ligon kun Rusio.

Fine mi volas esprimi ke la regiono estis bela, ege interesa, kaj perfekte romantika loko por mielmonato. Malgraŭ la populara imago en Usono, Krimeo ne estas lando de milito kaj bomboj. Apenaŭ estis batalado dum la anekso (malkiel la milito kiu okazas en orienta Ukrainio - tio estas alia afero). Ĝi estas lando kun riĉa historio, bona (sed dolĉa) vino, kaj belegaj pejzaĝoj. Pro manko de tempo kaj nesufiĉa stoko de kontanta mono, ni ne povis vidi ĉion kion ni volis, aparte la Tatarajn lokojn kiel la urbo Baĥĉisaraj. Do mi esperas reveni tien iam, kaj mi esperas vojaĝi tien sen la politikaj kapdoloroj kiuj okazas nun!





La Homa naskiĝo

Lottie Erickson

Antaŭ tri milionoj da jaroj la egipta dezerto estis maro. Grandaj ondoj kovris la teron kaj donis al balenoj, ŝarkoj, salmoj, konkuloj vastan akvejon por ennaĝi kaj envivi. Tamen, pro forta magnetismo la marrando puŝis la nordan malbordon suden. Nigraj, blankaj kaj flavaj montetoj de sablo aperis, sed baldaŭ ciklonoj kaj uraganoj platigis ilin kaj miksis la malsamkolorajn sablograjnojn, rezultigante belegan pejzaĝon de mola sablo plenigita de blankaj ostopecetoj, interesaj sortimentoj de fiŝdentoj kaj konkoj, kiuj ĉiun tagon brilis en la hela suno.

Iom da tempo post la ŝtormoj tri sablograjnoj, unu nigra, unu blanka kaj unu flava hazarde renkontiĝis dum subtera esplorado, esperante trovi neordinarajn objektojn de la plifrua tempo.

La nigra sablograjno trovis buntan plumon, svingis ĝin alte kaj diris "Mi havis revon ke mi vidis ion kovritan de tio moviĝanta en la ĉielo."

"Ankaŭ mi havis revon. Mi vidis ion similan al tio," vokis la blanka sablograjno kaj ĵetis pintan bekon aeren. "Ĝi portis ion similan kiel kurtan ŝnuron."

"Kaj mi, mi revas ofte ke mi vidas ion, kio balanciĝas sur altaj stangoj," kriegis la flava sablograjno metante akran ungegon en ostopetecon.

La triopo eksaltis kaj aplaŭdis pro ekscito pri siaj arkeologiaj trezoroj kaj cerbumis por inventi ion, kio povus uzi la plumon, la bekon kaj la ungegon.

"Mi devas konekti min kun la spirito de mia praavo por gvidi min," diris la nigra sablograjno.

"Mi devas mediti kaj imagi," diris la blanka.

"Mi devas premeĝi miajn cervohufojn por doni al mi bonŝancon," diris la flava.

Ili tute silentis dum tri tagoj kaj tri noktoj sed tiam io susuris, unue tre mallaŭte. Poste la susuro laŭtiĝis kaj aperis tri formoj, formoj kiuj malrapide ŝanĝiĝis al fantomoj kun kapoj, koloj, ŝultroj, brakoj, manoj, kruroj kaj piedoj.

La sekvan tagon la malsamkolora triopo vidis tri homojn, unu nigran, unu blankan kaj unu flavan. Ili kliniĝis, donis la manon al la tri sablograĵoj, dankis ilin kaj foriris, la nigra suden, la blanka norden kaj la flava orienten.

La inventema triopo unue estis malfeliĉa, ĉar ili esperis fari ion kio povus flugi, fosi por vermoj kaj konstrui nestojn en arbaro. Sed poste kiam ili malkovris ke ilia kreaĵo vojaĝas en aviadiloj pli rapide ol birdoj, vivas en domoj pli grandaj ol nestoj kaj kreskigas legomojn pli bongustajn ol vermoj, ili denove feliĉiĝis.

Ĉi tio estas la aŭtentika versio de la naskiĝo de la tri unuaj homoj en la mondo, konfirmita de la Monda Homa Arkeologia Instituto kun sidejo en Aleksandrio, Egiptio. Ekster la oficejo staris statuo de la sablotriopo.

Por pli da informo bonvolu kontakti

Sherman-on Doski: homanaskigxo@mohoinstituto.com

Legendo de Acersiropono



Longe, longe antaŭe kiam la mondo ankoraŭ estis tute nova, Gitchi Manitou (Granda Spirito) kreis ĉion por ke la popolo povu ĝui la vivon. Por ĉasi abundajn ĉasaĵojn en vetero ĉiam agrable klara, acerarbo enhavis plenplene dolĉan siropon. Kiam ajn oni volis siropon, oni rompis branĉeton kaj kolektis gutantan siropon.

Iun tagon Nanabozo (Avĉjo, servanto de Granda spirito, kiu havas magian kapablecon) ekpromenis murmurante "Ĉu mi vidu kiel fartas miaj amikoj Aniŝinabe-anoj?" Li atingis la vilaĝon kaj trovis neniun tie. Nanabozo serĉis en la ĉirkaŭo. Eble ili fiŝkaptas, kaj tiel pensante li iris al la lago, sed neniu estis tie. Aŭ eble ili plugas kampon, sed li trovis neniun tie. Aŭ eble ili kolektas fragojn, sed neniu estis kolektanta fragojn. Kie ili estis? Ĉiuj kolektiĝis ĉe acerarbaro apud la vilaĝo. Ili malfermegis siajn buŝojn kuŝante surtere, kaj estis lekantaj la siropon gutantan.

"Kion ili faras!?" Nanabozo kriis. "Tiel, oni nur dikiĝas kaj fariĝas pigrulo."

Nanabozo iris al rivero portante sitelon faritan el arboŝelo. Kaj multfoje li alportis akvon al la arbaro. Li grimpis al la pinto de acerarbo, kaj enverŝis akvon sur ĝin. La densa siropo maldensiĝis, kaj nur iom da dolĉeco restis en la suko.

“Ekde nun ĉiam estu tiel!” Nanabozo diris. “Ne plu oni povas kolekti siropon rekte de la arbo, nur maldensan sukcon. Se oni volus havi siropon, oni devas kolekti multe da suko, kaj devas boli ĝin. Por tio oni devas kolekti multe da brulligno. Oni devas baki ŝtonojn en la fajro kaj meti ilin multfoje en la sukcon, kolektitan en barelo, kiu estas ĉizita el trunko. Oni devas ripeti tion ĝis la suko boladas kaj finfine fariĝas siropo. Por kolekti iom da siropo oni devas laboregi. Tiel oni ne fariĝos pigrulo, kaj estos dankema pro la siropo, kion Gitchi Manitou faris por ili.”

“Ne nur tio, ni decidu ke tempo por kolekti sukcon estas unufoje jare, tiam oni ne pigremas por kolekti berojn, ĉasadi aŭ fiŝkapti, kaj plugi kampon. Jes, ni faru tion eterne!” Tiel Nanabozo diris kaj ankoraŭ tio daŭras.

El indiĝena rakonto



Kial Mi Elektis Boatadon Kiel Mian Hobion

Wally du Temple


Mi elektis vojaĝi per kanoto sur lagoj kaj riveroj de Kanado. Oni povas diri ke tio estas mia plej bona hobio. Kiel juna knabo, mia instruistino pri legado prezentis al mi la libron 'La Vento En La Salikoj', de Kenneth Grahame. La libro estas pri aventuro de talpo kaj aliaj bestetoj. Kiam Talpo por la unua fojo spektis riveron, li priskribis ĝin ĉi tiel:

"Li neniam en sia tuta vivo estis vidinta riveron – glatan, sinuan, kiel tutfortika besto, postkuranta kaj ridetanta, permane tenanta objektojn per sono de glugloj, kaj postlasanta ilin per ridego, por ĵeti sin sur novajn ludamikojn, kiuj skue liberigis sin, kaj estis kaptitaj kaj tenitaj denove. La tuto estis ekskuetoj kaj ekstretoj – fluo kiu glimas, fulmetas, fajreras, brilegas, susuras kaj kirlas, babilas kaj bobelas. La talpo estis ensorĉita, ravita, fascinita. Apud la bordo de la rivero li trotis kiel oni trotas, kiam oni estas tre malgranda, je la flanko de viro kiu tenas vin en ekstazo per rakontoj ekscitaj; kaj kiam li finfine laciĝis, li eksidis sur la bordo, dum la rivero daŭre al li babilis – babilada procesio de la plej bonaj rakontoj en la mondo, senditaj de la koro de la terglobo por esti aŭditaj fine per la nesatigebla maro."

"Kredu al mi, mia juna amiko" (diris Talpo) "Estas nenio – absolute nenio – eĉ duone tiom valora kaj farinda ol simple malordigadi en boatoj."

La aventuroj de 'Talpo' gvidis min al la hobia de boatado en lagoj kaj riveroj. En mia hejmpaĝo klaku je 'aventuroj'. Tie vi povas spekti albumojn pri miaj velboataj, riverboataj kaj kanotaj aventuroj.

wallydutemple.com/adventures





DIVERSAĴOJ

Peto al la kunlaboro por la ekspozicio en Jokohamo

Estimataj!

Mi estas membro de NeProfitcela Organizo (NPO) Esperanto Jokohama. Hodiaŭ mi havas peton al vi.

Ni havos ekspoziciojn de “Unuaj Lernolibroj” de naciaj lingvoj por lernantoj de la unua klaso en baza lernejo, du fojojn ĉi-jare en la aŭtuno (septembro kaj novembro). Ankaŭ en la lasta jaro ni havis saman ekspozicion, kaj ni povis prezenti 28 lernolibrojn de 17 lingvoj en la mondo. La lingvoj estis: la ĉina en Ĉinio kaj la norma ĉina en Tajvano, la korea en Koreio, la mongola en Mongolio, la bengala en Barato (Hinda Unio), la taĝika en Taĝikio, la vjetnama en Vjetnamio, la germana en Germanio, la rumana en Rumanio, la rusa en Rusio, la ĉuvaŝa en Ĉuvaŝio/Rusio, la ĉeĥa en Ĉeĥio, la slovaka en Slovakio, la kroata en Kroatio, la hispana en Meksikio kaj Ĉilio, svahila en Konga DR, kaj la angla en Aŭstralio.

Sed estas multaj aliaj lingvoj en la tuta mondo, kaj eĉ se la uzata lingvo estas sama, lernolibroj estas malsamaj kaj diversaj laŭ landoj kaj distriktoj politike kaj geografie. Do mi petas vian helpon!

Jen konkreta peto:

- (1) Sendu al ni lernolibron de la gepatra lingvo, kiun viaj/vialandaj unuagradaj lernantoj de elementa/baza lernejo uzas.
- (2) Kun ĝi aldonu esperantigitan tradukon de kelkaj frazoj el la unuaj paĝoj, kaj ties prononcmannero (laŭeble en Esperantaj literoj).
- (3) Aldonu jenan informon pri la libro: nomo de la lando, lingvo, en kiu aĝo oni lernas per ĝi; ĉu la lernolibro estas donacita/pruntita al la lernanto, aŭ lernanto devas aĉeti ĝin?
- (4) Kaj pri vi: nomo, adresoj poŝta kaj reta, kaj espereble via foto!

Bonvolu sendi la lernolibron nepre registrite, ĉar lastjare tri libroj ne atingis nin. Antaŭdankon!

Sendu la materialojn al: NPO Esperanto Jokohama,
ĉe (s-ino) Doi Ĉieko: Nisisiba 4-17-9, Kanazawa-ku, Yokohama-si, Kanagawa-ken
236-0017 Japanio

Informon sendu al info@esperanto.yokohama

Se vi konsentas kunlabori kun ni, ni estus ĝojaj ricevi la informon ĉe mia retadreso doi-cik@jcom.zaq.ne.jp aŭ ĉe info@esperanto.yokohama.

Kun antaŭdanko!

Doi Ĉieko (s-ino)

土居智江子



Peto de korespondo

Samideano, saluton!

Mia nomo estas Yusuph Paul. Mi loĝas en Tanzanio, suda parto de la lago Viktoria, en la urbo Bunda. Mi estas komencanto, mi lernas Esperanton en mia familio kaj en majo 2016 daŭrigis mian lernadon ĉe Bunda Esperanto-Rondo, kiu zorgis renovigi la Esperanto-movadon en mia lando.

Mi aĝas 14 jarojn, mi estas studento kaj mi vizitas elementan lernejon en la sepa klaso. En septembro ĉi-jare mi faros naciajn ekzamenon por fini la elementan lernejon. Kiam mi sukcesos bone mi aliĝos al la meza lernejo.


Mi ŝatus trovi eksterlandajn amikojn por korespondi kune por praktiki mian lingvon kun aliaj. Min interesas rilati kun aliaj homoj por paroli pri kelkaj aferoj, legi librojn pri historio, sciencoj, matematiko, ktp; ankaŭ viziti ĝardenojn, paroli pace kun aliaj, vojaĝi ktp.

Mi ĝojos se vi estos preta korespondi kun mi, mi atendas vian respondon.

Amike salutas vin,

Yusuph Paulo.

yusuphpaul67@gmail.com



Literumiloj kaj ortografia kontrolado en Esperanto

Lingvoilo (LanguageTool) estas liber-koda plurlingva programo por kontroli ortografion, gramatikajn erarojn kaj stilon de Esperantaj tekstoj. Ĝi funkcias ankaŭ por pluraj aliaj lingvoj.

«Lingvoilo» atentigas ankaŭ pri eraroj, ne trovitaj per simpla literuma kontrolilo.

Estas avantaĝo de Lingvoilo, ke oni povas uzi la programon ne nur en ĝia retejo, sed oni povas elŝuti kromaĵon (suplementan aldonan programeton) por sia retumilo. Post la instalado sufiĉas nur marki iun tekston per la muso, kaj la kromaĵo povas tuj indiki la eventualajn literumajn aŭ gramatikajn erarojn... (!)

La prizorganto kaj programisto de Lingvoilo estas Dominique Pelle. - Dankon al li!

Adreso de Lingvoilo: languagetool.org/eo/

Ekzistas ankaŭ du aliaj, bone funkciaj literumiloj kaj kontroliloj de ortografio:


- Lingvohelpilo ĉe visl.sdu.dk/lingvohelpilo/
- Esperantilo ĉe esperantilo.org

Eltirita de Lingvo-Studio,
www.eventoj.hu



KRUCVORTENIGMO DE TREVOR BROWN ANTIKVA EGIPTUJO

Printu tiun paĝon por provi la krucvortenigmon!



Transen:

1. Militan vehiklon
(2-radika kunmetaĵo)
5. La rivero
8. Sankta klakilo
9. Fama reĝino

10. Konservitulo

12. Patro kaj prapatroj
15. Lingvaj signoj
17. Knaba reĝo
18. Antikva papero
19. Sabla lando

Malsupren:


1. Preparado de
mortintulo
2. La kontinento
3. Antikva Sudano
4. Suda regiono estis tia
5. Fama reĝino

6. La reĝa moŝto

7. Dia kat'
11. Norda regiono estis tia
13. Vadbirdo
14. Dio de ĉielo
16. Tabullud'

Vidu la solvon en la venonta numero de Lumo!

LEGOMOJ



Transen:

- 4. Cepo/ajlo,
granda kiel antaŭbrako
- 6. Purpura
- 7. Enhavas verdajn foliojn
- 10. Grizaj fungoj

- 15. Malgrandaj verdaj
globoj
- 16. Pikanta
- 17. "Fingroj de sinjorino"
- 18. Spiko
- 19. Humuso

Malsupren:

- 1. Cirkloj en legoma supo
- 2. Larmanto pro tiuj
- 3. Pica saŭco pro tiuj
- 5. Ruĝa, malgranda,
kaj krakmaĉa
- 8. Kuniklo ĝuas ĝin
- 9. Popeye
- 11. Vaksa,
granda kiel kapo
- 12. Tofuo farita el tiuj
- 13. Longaj
- 14. Rusa supo

Printu tiun paĝon por provi la miksitajn vortojn!




Saluton, mia nomo estas Francina Fiŝo.

Esperantaj enigmoj plaĉas al mi. Ĉu enigmoj plaĉas ankaŭ al vi?



Mi havas liston da bestoj, sed la literoj estas miksitaj.
La ruĝaj literoj estas literoj en la frazo kiu solvas la enigmon.

Ĉu vi povas solvi ĝin?



Amike,
Francina la Flava Fiŝo



IMOSI	— — — — —
ROSU	— — — — —
UNHDO	— — — — —
OATK	— — — — —
LEEANFOT	— — — — —
AOFĜRI	— — — — —
LUPOV	— — — — —

Turnu kaj turnu ĉirkaŭ vi mem, sed,
mi ĉiam estas malantaŭ vi!

Kio mi estas?

— — — — —

Printu tiun paĝon por provi la vortan serĉon!

Mi ankaŭ kaŝis vortojn
en la kvadrato.
Se vi povas, trovu la vortojn!




Amike,
Francina la Flava Fiŝo

F	O	D	O	P	O	O	D	O	I	T	J
B	R	V	Ĵ	A	N	O	N	H	Z	G	D
Ĉ	E	A	J	T	I	P	N	I	O	U	A
N	H	R	T	R	P	E	A	N	Z	V	K
O	L	I	F	I	E	N	I	T	I	U	O
N	D	Ĝ	E	N	N	V	T	N	R	N	K
K	Ĝ	U	D	O	E	O	O	R	K	O	U
L	J	F	H	N	Z	B	K	L	D	E	H
O	F	R	A	T	O	L	I	C	M	C	J
R	Ĵ	O	V	V	E	N	Ĝ	H	Ĝ	Ĉ	P
A	V	O	Ĉ	E	O	N	I	L	I	F	I
N	A	Ĵ	R	Ŭ	Ŭ	P	A	A	J	Ĉ	O

AVINO
AVO
FILINO
FILO
FRATINO
FRATO

KUZINO
KUZO
NEPINO
NEPO
NEVINO
NEVO

ONKLINO
ONKLO
PATRINO
PATRO



Nu. Ĉi tie finiĝas la revuo.
Komentu ĝin, skribu al ni, sendu kontribuajojn,
kaj atendu la venontan numeron de Lumo!

Redaktorino: Kamila Koziej Lévesque

Enketisto: Geoffrey Greatrex

Provlegantoj: Bob Williamson, Geoffrey Greatrex, Francisko Lorrain

Kompostado: Kamila Koziej Lévesque

Kontribuantoj: Kamila Koziej Lévesque, Zdravka Metz, Richard Delamore, Matthew Chisholm, Yury Jakymec, Tamara ne Amara, Jed Meltzer, Lottie Ericson, Saĉjko, Wally du Temple, Doi Ĉieko, Yusuph Paul, Trevor Brown, Jason Donev